


La Krokodil'



Infombulteno de Esperanto-Kultur-Centro de Tuluzo

N° 44 – majo 2007

ENHAVO

Enhavo.....	1
Kalendaro.....	1
Okazis.....	3
Granda sukceso en Béziers.....	3
Mia sperto en Arrout.....	5
La Sat-Amikara kongreso.....	5
Kunlaboru kun La Krokodil'!.....	6

Kalendaro

La couleur rose indique que des bénévoles sont nécessaires.

Ven 04 mai, 20h : Repas-tchatte partagé à la Maison de quartier Rangueil,

19 rue Claude Forbin, 31400 Toulouse

du 4 au 6 mai : Week-end à Vallgorguina en CATALOGNE

En région Vallès oriental, à 45 km de Barcelone et Giron.

Cours, conférences, discussions, promenades avec nos amis Catalans.

Hébergement au gîte Can Clarens, dans la forêt de chênes.

Le voyage n'est pas inclus, covoiturage possible de Toulouse.

Organisateur : Kataluna Esperant Junularo , kej@esperanto.cat

mer 9 mai : Journée de l'Europe, Place du Capitole.

Stand de 10 à 18 h.

à 18h: chorale Franco-allemande: Hymne européen en français et allemand

sam 19 ~ dim 20 mai, au gîte La Maraude, à ARROUT en Ariège.

Initiation et pratique de la langue et de la culture espérantistes,

toute la grammaire, les phrases de la vie courante, et les utilisations possibles de l'Espéranto,

dix heures de cours réparties durant les deux jours,

et une soirée de jeux et films en espéranto.

Pour le niveau conversation : jeux, jeux de rôle, etc... .

Hébergement dans chambres de trois ou six lits.

Organisateur : EKC, 05 61 25 55 77, esperanto.toulouse@free.fr

jeu 24 mai, 20 h : soirée chantée, à l'occasion du Forum des Langues

au café le Bâton à Palabre, 15 rue de Thionville, 31000 Toulouse,

avec une chorale multilingue, invitée par Hélène et Jean René,

et un groupe de chanteurs

Esperanto-Kultur-Centro

1 place des Avions, 31400 Toulouse

tel/fax 05 61 25 55 77

esperanto.toulouse@free.fr <http://esperanto.toulouse.free.fr/>

espérantophones (répétitions durant le mois de mai, nous contacter au 05 61 25 55 77)

26-27 mai : forum des langues, place du Capitole à Toulouse

organisé par le Carrefour culturel Arnaud Bernard.

Samedi soir : "Capitada" : contes, poèmes, lectures, chansons... en diverses langues, dont espéranto.

Dimanche jusque vers 18 heures : stands représentant diverses langues

Au stand espérantiste, on pourra s'informer, discuter, consulter ou acquérir livres, revues et disques. A 15 h minicours découverte de l'espéranto.

ven 01 juin, 20h : Repas-tchatte partagé, au lac de l'Union.

Le rendez-vous sera au Lac, qui est à proximité de chez André Mirc (05 62 89 92 96), chez qui on se repliera en cas d'intempéries... Appelez André pour plus de précisions.

Suivant cette adresse d'internet vous trouverez une carte du lieu

<http://tinyurl.com/3auyjt>

Sam 9 juin : Escale métisse

Lieu : Parc de la Mounède

Stands (dont un sur l'espéranto) à partir de 14 h. (spectacles et animations dans la salle de concert.) Si vous pouvez tenir le stand, tél à Jeannette (05 61 22 55 77).

Organisateur : BellefontaineAsso (06.27.07.95.23)

sam 09 ~ dim 10 juin, au gîte La Maraude, 09800 ARROUT (Ariège)

Randonnée, découverte de la région, sa flore et sa faune

Soirée avec jeux, sketch et films en espéranto.

Hébergement dans chambres de trois ou six lits. Participation internationale souhaitée.

Organisateur : Sunkompanio, 05 61 96 82 08, sunkompanio@wanadoo.fr

ven 15 juin en fin d'après-midi et soirée : exposition sur l'espéranto

Lors de la Fête de la MJC d'Ancely, allée des Causses, Toulouse

du 20 au 24 juin (les après-midi) : stand espérantiste au Festival de la Terre

Au jardin du Grand Rond, Toulouse

OKAZIS

Granda sukceso en Béziers

Sabate la 17an de marto okazis manifestacio por la okcitana lingvo en Béziers, organizita de la Instituto pri Okcitanaj Studoj kaj kvin aliaj okcitanaj kulturaj asocioj. Tiu estis la dua tia manifestacio por la okcitana lingvo kiu okazas en Francio. La unua okazis antaŭ unu jaro kaj duono en Karkasono. La celo estis defendi la rajtojn de la parolantoj de tiu lingvo.

La manifestacio estis sukceso pro du kialoj. Unue 20.000 homoj partoprenis la manifestacion; tiu partoprenantaro estas preskaŭ duobla de la karkasona. Due, esperanto havis gravan lokon ene de la manifestacio kaj la okcitanistaro bone akceptis la partoprenantajn esperantistojn.

La partopreno de esperantistoj en tiu manifestacio estis organizita de la movado de okcitanistaj esperantistoj, kiuj kunigas en retlisto nomita EsperantOc, kaj de la Kataluna Esperanto-Asocio. Ankaŭ kelkaj anoj de EKC partoprenis la manifestacion kaj ankaŭ JEFO (Junulara esperanto franca organizo) ĝin subtenis.



IParŝo varbas en la budo

La esperantistoj kiuj partoprenis ne nur volis videbligi esperanton en tia medio, sed ankaŭ volis rekte subteni la okcitanan, ĉar defendi la

okcitanan estas ankaŭ defendi lingvan diversecon, kaj ĉiu esperantisto scias ke en Prago esperantistoj akordiĝis ke esperanto estas lingvo por lingva diverseco.

La esperantistoj de Béziers faris belan laboron tiutage. Ili loĝigis esperantistojn el aliaj urboj kaj ankaŭ starigis budon. JEFO pruntedonis banderolon en la franca lingvo, kaj la katalunoj kunportis banderolon en la okcitana. Tiel, estis du grandaj esperantaj banderolj en la manifestacio. La katalunoj kunportis ankaŭ faldfoliojn skribitajn en la okcitana. Tiuj faldfolioj estis granda sukceso.



Banderolo en la okcitana lingvo farita de la Kataluna Esperanto Asocio

Dum la mateno, la esperantistoj deĵoris en budo. Tie estis libroj kaj aliaj esperantaĵoj kiuj interesis la preterpasantajjn homojn. Multe da tiuj preterpasantoj demandis pri esperanto kaj interesiĝis pri ĉiaj flankoj de lalingvo. Plie, ili povis aŭdi esperanton parolatan de la multaj ĉeestantaj esperantistoj. Tiel, homoj povis agnoski ke esperanto estas lingvo kiu bone funkcias kaj eĉ kelkaj miris pro la fluaj konversacioj.

Post la tagmanĝo ĝis la vespero okazis la manifestacio tra la stratoj de Béziers, ene de kiu oni videbligis la du esperantistajn banderolojn.



JoMo, Pere kaj Parŝo (prezidanto de JEFO) apud la budo

Interesa aspekto de la tago estis la malkovro de multaj "kaŝitaj" esperantistoj, tio estas tiuj homoj kiuj iam lernis la zamehofan lingvon sed ne agas ene de la movado. Tiel ni povis paroli esperanton kun ili kaj konscii pri la fakto ke esperanto ne nur estas movada lingvo. Alia pozitiva flanko estis la ebleco paroli kun radiaj ĵurnalistoj pri esperanto kaj ĝia rolo por lingva diverseco.

Post la manifestacio homoj disiĝis por denove kuniĝi post la vespermanĝo en Bovplaco de Beziers, kie okazis okcitanana koncerto en bela etoso. Tiu koncerto, kiu dancigis ĉiujn, daŭris ĝis la 2a matene.



Ĵurnalista de sendependa radio intervjuas Parŝon, la prezidanton de JEFO.

Kiel dirite, la tago estis granda sukceso kaj por esperanto kaj por la okcitanana. Kaj estis ege

interesa ĉar du homoj de du malsamaj medioj povis koni alian movadon similan, kiel Marc, tuluza okcitanisto kiu iris al Beziers akompanata de kelkaj tuluzaĵaj esperantistoj. Li multe lernis pri esperanto kaj post tuta tago kun esperantistoj diris:

C'est pas comme de se retrouver a l'étranger sans connaître la langue, mais l'impression d'atterrir dans un jeu de rôle où tout est codifié. Des gens venant de n'importe où et se retrouvant dans un lieu donné.

Avec un peu d'écoute on capte quelques mots et, des fois, le sens de la phrase. On commence à se sentir moins à l'écart, avec un peu de pratique, on peut intégrer le milieu. Surtout si ça permet d'aller faire la fête aux 4 coins du monde!

Redakcio



Esperantista banderolo en la franca lingvo

Mia sperto en Arrout

EKC okazigas studajn semajnofinojn en la Pirenea vilaĝeto Arrout. Marion Quenut partoprenis la kurson kaj rakontas al ni sian sperton

La 17an kaj 18an de marto mi partoprenis lingvokursaron por praktiki la lingvon.

Kiel okazis? Tre bone.

Sabaton frue, Jeannette, Rikardo, mi, kaj Bruno, alia komencanto, veturis de Tuluzo ĝis Arrout, nun fama vilaĝeto situanta en la Kuzerana valo, en Pireneoj.

Tie nin kore gastigis kelkaj esperantistoj tiel, kiel ĉiufoje antaŭe aliajn grupetojn de lernantoj. Post kafeto ni ekstudis, Jeannette instruis komencanton Nadine kaj laaliajn kvin gelernantojn, jam pli spertajn, kunigis Moŝto Instruista Rikardo....

Post du horoj da konversacio pri iuj bildoj, ni tagmanĝis ekstere kun niaj gastigantoj. La vetero estis belega, jam printempa. Postmanĝe, ni decidis promeni ĝis alia vala vilaĝeto. Voje, ni babilis kaj konatiĝis pli bone. Tiumomente Rikardo ne kunvenis ĉar kutime je tiu horo li dormetas.

Je la kvara, ni revenis endomen por studi ĝis la vespermanĝo kaj post ĝi ni spektis filmon pri la konstruo de lernejo en Togolando. Interesa estis vidi kiel helpis projekton esperantista reto.

La sekvan tagon, ni rekomencis dum 3 horoj lernadon, interalie la korelativojn, tiel gravajn en la lingvo!

Poste, denove ni tagmanĝis ekstere kaj vetero estis tiel ke ne volis plu studi interne. Ni profitis bonan veteron, kaj kiam la nuboj venis, ni revenis al la granda urbo.

Mi tre ŝatis la semajnfinojn kaj mi eliris kontenta kaj konvinkita ke en la vivo eblas ligi utilon kun

agrablo.

Marion Quenut

La venonta semajnofino en Arrout okazos je la 19a kaj 20a de majo. Ne forgesu aliĝi! (vidu la kalendaron)

La Sat-Amikara kongreso

De la 7a ĝis la 10a de aprilo okazis la SAT-amikara kongreso en Artigues apud Bordojo.

Mi ĝojis ĉeesti ĉar la programo estis tre interesa kaj diversa. La kongrestemo estis « *Esperanto kun la aliaj alternativaj movadoj* ». La Ĝirondanoj bonvenigis neesperantistojn kiuj same batalas por la homa progreso.



La halo de la kongreso

Por neesperantistoj estis specialaj prelegoj franclingve kaj aliaj prelegoj kun traduko, el kiuj unu estis de Margarita Handzlik. Ŝi estas Pola esperantistino. Ŝi fariĝis eŭrodeputitino en 2004. Ŝi zorgis pri esperanto en la Eŭropa parlamento. Kian lingvan situacion ŝi malkovris ene de la Eŭropa parlamento? Pri tio ŝi prelegis: « *Lingva egalrajteco aŭ nur- anglalingva Eŭropo* »

Alia prelego estis de Kimie Markarian, Japanino kiu vivas en Britio. Ŝi prelegis pri *Sorobano*: japana tradicia kalkulilo. Ĝi estas miksaĵo de diversaj kulturoj ĉina, hinda, japana kaj araba. Krome, ŝi instruis al ni *Origami*-on: konata japana vorto « paperfaldado ».

Estis ankaŭ diversaj atelieroj :

- Piedmasagxo
- Lerni regionajn dancojn
- Iniciado al Esperanto
- Iniciado al vin-gustumado

Mi ĉeestis du aliajn interesajn prelegojn kiuj nomiĝis: “*Kio estas la NEF?*” (1) kaj “*Kio estas AMAP?*” (2) pri ekologiaj faktoj.

Seriozaj temoj, sed mi ne volas forgesi ke mi tre bone amuziĝis kun la TTT (Teatra Trupo de Tuluzo)-prezento kaj la koncerto de JoMo kun liaj muzikistoj!!!

Pri la regiono, oni organizis por la geesperantistoj ekskursojn: vizito de Bordoza tramo, Arkaŝongolfeto kaj ĉiĉeronoj pri vinbereja regiono.

Finfine estis bona sperto por mi ĉar mi renkontis alian flankon de esperanto movado; maljuna sed tre certe afabla.

Mia venonta malkovro estos la UFE-kongreso en Bourg en Bresse je pentekosto....
Mi promesas rakonti al vi!!!
Samia Harir

Notoj [de la korektinto]:

- (1) *La Nouvelle Economie Fraternelle* estas kooperativo porfinanca kiu alpruntas por solidarecaj aŭ ekologiaj projektoj .
- (2) *Association pour le Maintien d'une Agriculture Paysanne*, organizas rektan aĉeton de nutraĵoj ĉe la produktantoj.

KUNLABORU KUN LA KROKODIL'!

Ĉu vi ĉeestis en iu aranĝo rilata al Esperanto? Ĉu vi konas iun interesan retejon por esperantistoj? Ĉu vi estas skribema?

Sendu viajn kontribuojn al nia bulteno, tiel ĝi pliboniĝos! Kaj ne forgesu sendi viajn fotojn!

La venonta Krokodil' aperos je la unua semajno de julio. Sendu viajn kontribuojn almenaŭ unu semajnon antaŭe.

La retadreso de la redaktoro estas

pere@quintanasegui.com

Pere Quintana Seguí